

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2003



En la julfesto de turkuanoj kantis Merja Outila, Anna-Liisa Ali-Simola kaj Leena Riuhu, interalie tekston En grandaj arbaroj de Edith Södergran (trad. Sabira Ståhlberg), kiu premieris en la 40-jarfesto de EST, kaj Vesperkanton laŭ melodio de Kablevskij (trad. Erkki Pohjola). (Artikolo sur p. 22; fotoj: Anna Ritamäki)

Vintraj Tagoj, p. 14 ♦ Mikael Niemi, p. 10

Feliĉo 50-jara, p. 6 ♦ Seminaria kunsido de EAF-estraro, p. 18



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritämäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritämäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritämäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteeri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ annaliisa.heikkinen@surfeu.fi

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Synnöve Mynttinen, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

Jukka Noponen, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Irja Miettinen, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ (05) 453 0653 ✉ irja.miettinen@WWnet.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Komune videbligi nin en specifa dato

Deklaro de specifaj temjaroj, temsemajnoj kaj temtagoj estas rimedo akiri videblecon por certa temo, problemaro aŭ solvaro. Specifaj kune festataj tagoj povas ankaŭ fortigi la komunecosenton de specifa grupo. Ĉe niaj festotagoj ni sentas apartenon al io pli vasta. Ekz. kiam ni festas la tagon de sendependeco de Finnlando la 6an de decembro ni nutras komunajn valorojn, apartenecon al lando, kie ni povas regi niajn proprajn aferojn. Similan funkcion havas la 15a de decembro en Esperantujo. Tutmonde kolektiĝas esperantistoj por rememori pri Zamenhof aŭ simple por atenti nian literaturon kaj kulturon ĝenerale. Tamen, tiu dato ne estas la plej oportuna por atingi vastan gazetaran atenton.

Anna-Liisa Ali-Simola de Turkio faris proponon al EAF. Ŝi volis instigi nin al kunordigita agado ĉirkaŭ iu tago por ke ni atingu vastan atenton tutlande, por doni komunan forton al niaj diverslokaj agadoj. La estraro diskutis la aferon kaj principe ni konsentas. Ni ne scias ĉu ni sukcesos bone kunordigi ion tian, sed jen almenaŭ kelkaj pensoj pri la temo.

Iuj iam, ŝajne en la 80aj jaroj, iuj esperantistoj anoncis la unuan sabaton de oktobro kiel Agotagon, dum kiu esperantistoj en multaj urboj de la mondo samtempe manifestaciu aŭ alie montru esperanton al la granda publiko. Ili estu informitaj pri la planoj en aliaj urboj kaj povu anonci al la ĵurnalistoj ke okazas same en X urboj en Y landoj, tiel fortigante la impreson de la agado. Ankaŭ ni en Finnlando iom partoprenis, interalie festante 100 jarojn de esperantlingva teatro en la aĉetuma kvartalo Hansa en Turkio (foto poste publikiĝis ankaŭ en la revuo Esperanto kaj instigis mokadon flanke de Bernhard Golden, sed tio jam estas amuza detalo).

Nu, ĉu la Agotago estas la konvena kuniga dato? Eventuale jes, sed mi persone pli ŝatas la Eŭropan lingvotagon deklaritan unuafoje por la Eŭropa lingvojarlo 2001 kaj poste de Konsilio de Eŭropo kiel konstantan temtagon. Tiu tago ebligas kunagadon kun aliaj grupoj, partoprenon en io pli vasta. Ni povas partopreni en eventoj organizitaj de aliaj kaj mem organizi eventojn invitante aliajn. Tamen, ni verŝajne ne povas atenti ke aŭtomate okazos multaj eventoj tiutage. La ŝtataj organizaĵoj ne povas atenti ĉiujn eblajn temtagojn. Dependas de la civitanoj kaj de bonfaraj organizaĵoj ĉu iu specifa tago estos konsiderata sufiĉe inda por festado. Supozeble ekz. la organizaĵo de lingvoinstruistoj havas intereson uzi la tagon por atentigi pri la graveco de lingvoinstruado, sed ni ne povas atendi ke ili agu. Gravus agi ankaŭ meminciate.

Cetere ĉi-monate, la 21an de februaro, okazis la tago de la patrino lingvo deklarita de Unesko en 1999. Ĉu vi rimarkis ĝin? Verŝajne ne, sed ankaŭ ĝi povas esti okazo por ni videbligi nin se ni bone planas. Ekz. UEA eldonis deklaron en esperanto kaj kelkaj aliaj lingvoj. Mi ne scias kiom vaste disvastigita ĝi estis, sed ĝi almenaŭ atingis iujn homojn, kiuj denove povis konstati ke la esperantistoj havas intereson pri mondaj, specife pri lingvaj, temoj. Cetere, la 21a de februaro okazas ĝuste dum la Semajno de internacia amikeco, semajno multloke festata ĝuste de la esperantistoj.

Bonan esperantlingvan tagon, hodiaŭ, kaj bonan esperantlingvan jaron 2003 al vi deziras via prezidantintino

Anna Margareta

Gitaristoj en prizono en Uralo

En oktobro 2002 mi laboris en la konkursa juĝantaro de la Urala gitarfestivalo en Ĉeljabinsko, urbo kun dubinda reputacio kiel konservejo de nuklea rubo. La alia el EU invitita gasto estis sveda gitaristo Miro Simic. Li devenas el Bosnio, sed estas de 12 jaroj civitano de Svedio, kie li jam antaŭe loĝis dudekon da jaroj. Post la malfeliĉa milito en Bosnio li aranĝis grandan gitargalaon, per kies profito li havigis instrumentojn por tuta gitarorkestro kaj transportis ilin al Bosnio, kie ili plu plenumadas sian taskon. Dum sia antaŭa vojaĝo al la Urala gitarfestivalo Miro aŭdis pri porinfana (porjunula) prizono en Zlatoust, kaj ekhavis la ideon, ke oni povus porti ankaŭ tien iom da konsolo per donacitaj gitaroj. Pensite kaj farite – per Gitargalao 2 li gajnis monon por havigi ses gitarojn de hispana faranto.

Kiel organizanto de la festivalo laboris Sharif Muhatdinov, ano de la Urala Gitartrio kaj forta kontribuanto al la Ĉeljabinska gitarmiraklo. Plenuminte niajn festivalajn taskojn ni tri ”sindediĉintoj”, Miro, Sharif kaj mi, ekveturis al Zlatoust. Survoje ni pasigis ŝildon ”Moskvo 1700 km”.

En nian celon, la Infanprizonejon en Zlatoust, ni povis surprize facile eniri. Pro la reputacio de malliberejoj en Rusio mi atendis, ke ĝi estu aĉa plenŝtopita morbejo, sed ĝi montriĝis tute ne tiom teruriga. La konstruaĵoj estis malnovaj sed sufiĉe sendifektaj kaj puraj, la kortoj eĉ beletaj. La malliberuloj loĝas po ĉ. 15 en ĉambregoj, kie la litoj prenas duonon de la planko. En ili videblis floroj

kaj eĉ pentraĵoj sur la muroj. En la ejo troviĝas 250 nigre vestitaj knaboj kun razita kapo; la plejmulto estas 16-18-jaruloj. Mi havis eĉ eblecon gustumi ilian manĝaĵon. Ĝi estis bona kaj multflanka, kvankam mankis freŝaj legomoj.

La gardistoj ne portas armilojn, almenaŭ ne videble, sed la disciplino estas armeeca, kaj kiam gardisto proksimiĝas al grupo da knaboj sur la korto, ili salutas unuvoĉe kaj laŭtege. Ankaŭ en la koridoro de sia loĝejo salutas unuopaj knaboj ĉiun gaston per ”trast”. Tion faras cetere ankaŭ civilaj infanoj ekster la ejo!

Kvankam la eksteraj cirkonstancoj de la ejo estas decaj, estas kortuŝe aŭdi, ke oni elpagas tie longajn punojn, eĉ 7-9 jarojn pro mortigo, farita kiel 15-jarulo, ebria. Laŭ mia kompreno el la infanprizonejo eblas liberiĝi jam pli frue, se la malliberulo boniĝas konvinke. Sed mi konatiĝis ekzemple kun senpatra knabo, al kiu la patrino rompis ĉiun kontakton – kien li iru? Se la puno de malliberulo plu daŭras, kiam li iĝas 18-jara, li povas elekti, ĉu li restu tie ĝis sia 21-jariĝo aŭ transiru al prizono por plenkreskuloj.

Alveninte ni unue iom konatiĝis kun la ejo dum eta rondpromenado, kolektiĝis poste en ia prelegejo kaj malpakis la gitarojn. Trideko da knaboj estis gvidataj al nia unua gitarleciono kaj el ili ni elektis ses kiel aktivajn lernantojn. Miro kutimiĝis en sveda komunuma muziklernejo gvidi komencantajn grupojn, kaj ĉar li estas entuziasmiga prezentanto kaj sufiĉe bone parolas la rusan, la la-

boro iris glate. Li eĉ lernis la nomojn de la ses knaboj preskaŭ unuaaŭde. Ni instruis pecojn, kie niaj lernantoj ricevis la parton de akompananto aŭ kantis, kiel ankaŭ la aŭskultantoj.

Oni permesis al ni instrui nur unu horon, kvankam ni volonte estus laborintaj tri aŭ kvar. Kelkaj civiluloj sekvis nian instruadon kun intereso. Ili estis instruistoj de la prizoneja lernejo. Dank' al ilia apogo Miro rajtis la sekvan tagon foti kaj surbendigi per video nian laboron, kio estis komence malpermesita. Ni interkonsentis ankaŭ, ke la kurso finiĝu per koncerto.

La duan tagon ni daŭrigis la laboron kun la samaj ses junuloj. Ankaŭ en la ejo troviĝis du gitaroj, el kiuj unu montriĝis uzebla, la alia bezonintus pli grandan riparadon. Ni metis la celon iom pli alten ol la antaŭan tagon kaj iom dividis taskojn inter la grupanoj. La instruado daŭris ree nur unu horon, post kio ni kolektiĝis en ĉambrego kun sufiĉe bona akustiko. Ĉeestis ĉiuj malliberuloj kaj dekelkaj civile vestitaj aŭskultantoj. Niaj ses lernantoj venis fervoraj sur la podion, ni ludis kaj kantis kun ili kaj prezentis ankaŭ kelkajn solopecojn. La provluditaj grupaj pecoj sonis riĉe, la publiko kunvivis ridetante kaj aplaŭdis forte. Feliĉaj estis ankaŭ ni instruistoj pro la ĝojega akcepto de nia laboro.

Ni profunde esperas, ke la gitaroj restu sendifektaj kaj la funkciado daŭru, kio kompreneble okazos nur kondiĉe ke iu loka kompetentulo transprenas la taskon. Kaj sendube ni iniciatintoj de la gitara bando ree enprizoniĝos dum nia postaj vojaĝoj al Uralo.

Kaj la fina demando: ĉu tio indus? En Rusio estas amase da pli grandaj problemoj. Sed tamen, la plibonigon de la mondo oni povas komenci ekzemple kolektante ĉiutage

rubajeton de sur tero. Ni kredas, ke per la arta terapio ebligita per la gitaroj almenaŭ iu el la malliberuloj kapablos kolekti kunen la splitojn de si mem kaj resti post sia liberigo ekster prizono. Kiam ni eniris en la malliberejon, la pordogardisto ordonis al Miro, ke li malfermu sian gitarujon kaj montru ĝian enhavon. Miro konstatis: "Jen mia Kallaŝnikovo!". La gitaro ja estas forta armilo por ŝanĝi la mondon!

Vesa Pölkki

La aŭtoro eklernis Esperanton en kurso en Laborista Instituto en Jyväskylä en la sepdekaj jaroj pro la ideoj ligitaj al la movado, sed post nelonge li devis lasi regulan studadon pro aliaj vesperaj okupoj. Post dudeko da jaroj lia onklo Pentti Makkonen komencis disponigadi al li E-literaturon. Por povi legi ĝin Vesa plivastigis sian vortprovizon kaj eĉ kompilis propran komputilan vortareton. La Vintraj Tagoj en Kuopio en 1998, kie li kontribuis al la vespera programo, signifis plian paŝon al aktivado, sed tion malhelpis lernado de aliaj lingvoj (la hungara, la rusa kaj la itala), urĝe bezonataj pro fakaj kaj hobiaj kialoj. Kune kun Anja Karkiainen li kreis dudekon da E-kantoj, el kiuj tri partoprenis kaj premiigis en la Belartaj Konkursoj de UEA. Ses porinfanaj kantoj aperis en la gazeto Juna Amiko, al kies konstanta kontribuanto li apartenas. Li mem prezentis siajn kantojn (inter multo alia) en KEF 2000 kaj en poezia vespero de Esperantoklubo de Helsinki. Per du E-kantoj li pliriĉigis la programon de koncerto de sia klaso en Kuopion konservatorio, kie li laboras kiel gitarinstruisto.

Feliĉo 50-jara!

Vintraĵ birdoj pepadas, ke Feliĉo (Onni Kaupinen) en Iisalmi kvindekjariĝis en februaro. Kvankam li ofte vojaĝadas al Esperantokunvenoj, ne ĉiuj finnaj esperantistoj konas lin. De multaj jaroj li agadas en Esperantoklubo de Iisalmi kaj ofte gastigadas eksterlandajn esperantistojn. Ni igu lin iom rakonti pri si mem.

Feliĉo, kiam vi fariĝis esperantisto kaj kial?

– Mi eklernis Esperanton en 1974, en studrondo gvidata de rektoro Reino Eriksson en la Civitana Instituto de Iisalmi, kie la instruado komenciĝis jam unu jaron pli frue, sed tiam mi ne povis partopreni, ĉar mi faris mian militistan servon. Kune kun mi en la studrondo Esperanton lernis trideko da entuziasmoj, kaj ni fondis nian propran asocion, Esperantoklubon de Iisalmi jam aŭtune 1974. Ekde la komenco de mia interesiĝo pri Esperanto mi partoprenadas, laŭ miaj ebloj, kiel eble plej variajn kaj multajn Esperanto-eventojn kaj en Finnlando kaj ekster ĝi. Ĉiam Esperanto al mi estis kaj estas vivanta kaj uzinda lingvo.

Ĉu vi tuj esperantigis vian nomon?

– Jes ja. ONNI estas tiel bona nomo, ke ĝi nepre estu esperantigita. La signifon de la finlingva nomo malsamlingvano ja ne povas kompreni sen la traduko.

Kio estas via metio, aŭ eble vi havas plurajn?

– Mi estas terkultivisto, kiu produktas lakton. La brutaro nombras 40-50 gebovojn.

Ĉu via laboro dum la lastaj jaroj iĝis malpli gajniga, pli malfacila?

– Eŭropa Unio kaŭzas al la kultivisto multan paperlaboron. Tiusence ĝi pliigis la laborŝarĝon. Rilate la monon, EU ne kaŭzis multan gajnon aŭ perdon. Adaptiĝemulo ĉiam elturniĝas.

Kial vi nomis ankaŭ vian traktoron Feliĉo? Ĉu ĝi ankoraŭ funkcias?

– Sur la flanko de mia traktoro vidiĝas mia

nomo Onni en Esperanto, do, FELIĈO. La traktoro estas finna kaj bone funkcias. Ĝi estas reklamilo por nia lingvo. Neniu alia havas similan traktoron. Kiam oni mendas traktoron, oni rajtas decidi, kiukolora ĝi estu, kion ĝi povu fari kaj kio ĝi nomiĝu. La fabriko realigos la dezirojn de la mendinto. Mia traktoro laboras por mia bieno kaj por Esperanto.

Kio en la Esperanto-movado ne plaĉas al vi? Sincere diru!

– Pri la movado mi apenaŭ povas diri ion negativan. La principoj daŭre estas tute ĝustaj. Sed min ĉagrenas, ke nuntempe estas tre malfacile igi gejunulojn interesiĝi pri Esperanto, almenaŭ en Finnlando estas tiel. Regas nur usona supernacieco. En la kongresoj de UEA mi tamen trovas plibonigendaĵojn: Kelkfoje okazas, ke aliĝinto kiu jam pagis sian kotizon tamen ne povas partopreni pro kialo, kiu ne de li dependas kaj kiu estas nevenkebla. Estus bonege, se la ne-repageblan kotizon oni povus uzi por la sekva kongreso. Mi kredas, ke almenaŭ la agrikulturistoj ĉie en la mondo bone scias la kapricojn de la vetero. Ili scias, kia estas vivo tute dependa de la naturo. La laboro de la terkultivistoj farenas kiam ĝi fareblas. En du lokoj, surkampe kaj enkongrese, oni ja neniel povas esti.

Kiajn ĝojojn kaj sukcesojn vi spertis dum via esperantista vivo?

– Ĝojojn mi trovis precipe vojaĝante. Mi jam vizitis pli ol tridek landojn. Pluraj el miaj vojaĝoj celis kongresojn. Ĝojigis min ankaŭ la multaj vizitantoj kaj gastoj en mia hejmo. Mi gastigis homojn el diversaj partoj de la mondo kaj ĉiam ni bone interkompreniĝis pere de nia komuna Esperanto. Laŭ ili, loĝi en traba saŭnokabano surborde de bela lago en la finna provinco Savo povas esti preskaŭ nekredbla travivaĵo al homo, kiu venas de la bruo de urbegoj. Tempo permesante, mi ĉiam ekskursas kun miaj gastoj al inte-



Onni Kauppinen – Feliĉo – kun sia bona amikino Dana Messner krozas ĉe la rivero Vltava en Prago.

resaj lokoj en nia regiono kaj ni ankaŭ partoprenas kulturajn eventojn. Esperanto kreis inter ni plurajn daŭrajn amikrilatojn.

Pri kio vi revas kiel 50-jarulo? Se bona feino realigus viajn 3 dezirojn, kion vi dezirus?

– Miaj nunaj revoj kaj deziroj pli malpli samas kiel miaj revoj en la juna aĝo. Fakte mi povus samopinii kun Reino Eriksson, kiam li diras, ke se bona feino promesus realigi unu mian deziron, estus saĝe deziri, ke ĉiuj bonaj aferoj realiĝu en la vivo. Poste oni ne plu bezonus elpensi la tri dezirojn, kiel okazas en la fabeloj. Sed se bona feino vere promesus realigi tri dezirojn miajn, la unua estus ĝuste tiu, kiun mi supre menciis. Por esti certa, mi plu dezirus, ke ĉiuj homoj en la mondo sciu Esperanton, kaj mi kredas, ke se tiel okazus, ne plu okazus militoj kaj nenecesa konkurenco. Mia tria deziro estas, ke mi trovu konstantan Esperanto-amikinton ie ajn en la mondo.

Ĉu iu el viaj junaĝaj deziroj realiĝis?

– La plejparto el miaj junulaj revoj pri Esperanto realiĝis. Precipe la vojaĝoj kaj la diversaj kaj oftaj homaj rilatoj multegon donis al mi. Sen Esperanto mia vivo estus pli banala, triviala. Mi povus diri, ke el miaj multnombraj ŝatokupoj Esperanto estas la plej bona, sed ne, ne tiel mi diros. Esperanto estas ne ŝatokupo, ĝi estas vivmaniero.

Kara Feliĉo, EAF kaj la redakcio de Esperanta Finnlando dankas vin pro via multjara laborado en la Esperanto-movado! Sanon kaj sukceson al vi! Longe plugu via verda traktoro siajn sulkojn! La bona feino realigu almenaŭ unu el viaj nunaj deziroj!

*Intervjuis la redaktoteamo
helpe de Reino Eriksson*

La adreso de Feliĉo/Esperantoklubo de Iisalmi troveblas fine de Esperantolehti. Lia reta adreso estas <onni.kauppinen@pp.inet.fi>.

Mi estas kontenta ĝenerale...

Michel DUC GONINAZ, 69-jara docento pri la rusa lingvo en la Universitato de Provenco (Aikso-Marsejlo), la Esperantisto de la Jaro 2002, afable konsentis respondi al niaj demandoj.

LOdE: Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

MDG: Surprize, kompreneble. Ne nur mi ne sciis, ke mi estis proponita por tiu honora titolo – kio certe normalas laŭstatute – sed mi eĉ ne memoris pri ĝia ekzisto. Avertita de Halina Gorrecka telefone, mi provis maski mian surprizon per ŝerco (“Nur de la jaro? Kial ne de la jarcento?”)... Mi ĝis nun ofte respondis al intervjuoj, ke mi estas esperantisto de la jaro 1946, kaj nun mi devas esti la esperantisto de la jaro 2002. Sed, diable, tiu jaro jam estas for!

Krome atingis min la informo pri Liro-2002. Mi tre ĝojas, ke mia traduko de Sologub plaĉis al la juĝkomisiono.

LOdE: La internacia elektantaro voĉdonis por vi, ĉar ĝi alte taksis la Novan PIV, kies reviziadon vi gvidis dum pli ol jardeko. Ĉu vi mem estas kontenta pri la rezulto de via laborego?

MDG: En aprilo 2002 mi estis kontenta, ke la laboro finiĝis. En julio mi estis kontenta, ke la vortaro aperis. Pri la rezulto mi povas trankvile diri, ke mi estas kontenta ĝenerale, sed malkontenta pri diversaj detaloj. Sed mi ne volas senigi la recenzistojn je iliaj laŭrajtaj malkontentoj.

LOdE: Ĉu en Esperantujo leksikografoj havas pli da respondeco pri la lingvo ol la aŭtoroj de nacilingvaj vortaroj? Ja en Esperantujo mankas lernejoj, universitatoj, tagĵurnaloj, teatroj, televido kaj aliaj institucioj kiuj evoluigas la lingvon.

MDG: Fari komparon kun nacilingvaj vortaroj

estas malfacile, ĉar la rolo de vortaroj povas tre varii de unu lingvokomunumo al alia. Koncerne nian lingvon, certe mankas al ĝi vasta ĉiuflanka kaj ĉiutaga uzado. Sed la lingvouzon kaj la leksikon evoluigas ĉiuj lingvouzantoj, precipe la verkistoj, ĵurnalistoj, fakuloj. Oni ne troigu la rolon de leksikografoj en tiu evoluo. La tre interesa artikolo de Sten Johansson en la maja *Ondo* montras, ke la esperanto-uzantoj ne adoptas blinde ĉion, kio troviĝas en PIV aŭ aliloke. Sed evidente la leksikografoj havas gravan respondecon pri la normigo kaj la unuecigo de la lingvouzo. Mi provis speguli la uzadon kaj samtempe ne kaŝi miajn preferojn. Tiu dialektika rilato povas esti konflikta, sed ĝi devas esti ankaŭ fruktodona.

LOdE: Kaj kio pri nia Akademio?

MDG: Decidojn ĝi publikigis lastan fojon en 1990, kaj ilia utilo montriĝis dubinda. La lastaj seriozaj verkoj de la Akademio estas la *8-a Oficiala Aldono* kaj la *Baza Radikaro Oficiala*, publikigitaj en 1975.

LOdE: Se vi havus eblecon enPIVigi nur unu vorton, kiu vorto ĝi estus?

MDG: Aikido.

LOdE: Ĉu Esperanto bezonas krom PIV unulingvan vortaron por lernantoj?

MDG: Ekzistas vortaro malpli ampleksa, malpli kosta kaj pli facile manipulebla ol PIV: la *Plena Vortaro*, kiu ankaŭ bezonas drastan renovigon. Sed evidente oni povas, eble eĉ devas, kompili pli simplan vortaron por kutimigi la novajn esperantistojn al la uzado de vortaro unulingva.

LOdE: Kelkaj kredas, ke komputilaj vortaroj baldaŭ anstataŭos la nunajn presitajn vortarojn. Ĉu vi same opinias?



MDG: Ne (almenaŭ se mi ĝuste komprenas la vortojn *baldaŭ kaj anstataŭi*). Sed mi evidente pledas por KD-a eldono de PIV.

LOdE: Al kiu(j) persono(j) vi mem domus via(j)n voĉo(j)n, se vi estus elektanto ĉi-jare?

MDG: Se mi estus elektanto, mi respektus la sekretecon de la voĉdono kaj do ne respondus al tiu demando. Sed, ĉar mi ne estas elektanto, mi ne vidis la plenan liston de la 18 proponitoj kaj sekve ne povas elekti inter ĉiuj. Tamen mi ne volas forĵongli vian demandon.

Estas vere, ke la nova PIV estas la evento de la jaro 2002. Tial mi opinias, ke dua persono devus esti menciita egale kun mi kiel respondeculo de tiu evento: mia kolego Klaŭdo Roŭ, sen kiu la nova PIV ne ekzistus aŭ ne estus tia, kia ĝi estas.

Liaj meritoj cetere ne limiĝas al lia gravega rolo en la redaktado de PIV. Li estas kunaŭtoro de grava esperantlingva libro pri likenoj, preskaŭ 900-paĝa, kiun nepre devas konsulti ĉiu serioza likenologo (ĉu vi konas alian esperantlingvan libron, kiun akiras precipe "neesperantistoj"?). Li estas redaktoro de plurlingva botanika revuo, en kiu aperas esperantlingvaj resumoj de ĉiuj artikoloj. El la 60 fakuloj de lia Instituto li estas la sola, kiu verkas nur en siaj du lingvoj, Esperanto kaj la franca. Tio signifas, ke li ĉiam rifuzas verki artikolojn anglalingvajn malgraŭ la premoj de liaj estroj (francaj!). Ĉu oni konscias pri tio en Esperantujo?

Sed la rezultoj de la voĉdonado montris, ke oni povas atenti ne nur PIV-on kaj la jaron 2002. En tiu ĉi vidpunkto mi evidente aldonus mian voĉon al tiuj, kiujn ricevis Ilona Koutny, kies laboro lingvosciencia, leksikografia kaj pedagogia, estas impona.

LOdE: Tradicia demando: Ĉu via esperantista agado malhelpas al via profesia laboro aŭ vi sukcesas utiligi profesie Esperanton?

MDG: Ĉi tiu demando ne plu aktualas, ĉar mi emeritiĝis. Sed, dum preskaŭ tridek jaroj, la instruado de Esperanto okupis kvaronon aŭ trionon de mia oficiala labortempo en la universitato.

LOdE: Ĉi tiu intervjuo aperos en la centa kajero de La Ondo de Esperanto. Kiun opinion vi havas pri ĉi tiu revuo?

MDG: Ĝenerale pozitivan. Sed *LOdE* ŝajnas al mi iom tro movadeca. Multaj informoj pri esperantistaj aranĝoj estas legeblaj aliloke. Mi bone komprenas, ke ĝi ne povas esti nur beletra, sed ĝi povus pli bone plenumi sian rolon de "sociokultura revuo".

Tiun deziron mi dividas kun Alen Kris, laŭ lia artikolo en la numero de januaro 2002.

LOdE: Neevitebla demando – viaj planoj?

MDG: Tuja projekto, jam plenumata, estas la korektado de la eraroj de la nova PIV por dua, probable baldaŭa, eldono. Aliaj eventualaĵoj (renovigo de PV, tradukoj kc) estas ne tiel certaj, ĉar nenio pli malcertas ol la morgaŭo. Kaj estas tiel agrable vivi senplane...

LOdE: Fine, ankoraŭ unu tradicia demando: Kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, estante ekzilota al nelogata insulo?

MDG: *En barko senpilota kaj Duonvoĉe*. La trian mi elektos lastamamente ĵus antaŭ la forveturo, ekkonsciante, ke vere min atendas insulo nelogata. Do, probable *Hetajro dancas*.

*La Ondo de Esperanto.
2003. N-ro 1 (100).*

Pri iaspeca popularmuziko...

La 21-an de februaro ricevis sian premieron en urba teatro de Oulu teatraĵo, kies manuskripton, laŭ la romano de Mikael Niemi "Populäärimusiikkia Vittulajänkältä", verkis Ilpo Tuomari-la. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne legis la libron, vi permesu, ke mi iomete rakontu pri ĝi.

Vittula (la naskiĝloko de la verkisto) estas parto de komunumo Pajala, en Svedio, en la regiono de Torniorivero. Estas pasantaj la 60-70-aj jaroj, meze de novaj manieroj, strangaj fenomenoj, kiujn la pli aĝa generacio primiras kaj kontraŭstaras. Venas ekzemple la rokmuziko.

La knaboj, Matti kaj Niila estas amikoj. La gepatroj de Niila estas lestadianoj, kaj la atmosfero hejme estas silenta, enfermiĝema. Niila eĉ ne babilas; Matti kredas, ke li eĉ ne scias paroli. Iam kaj tiam Niila volas aŭskulti radion ĉe Matti. Foje Niila surprize diras:

– Soifa, donu al mi akvon!

Matti kredas, ke Niila estis kreinta propran kaŝlingvon. Niila instruas, Matti lernas, kaj iom post iom ili uzas la lingvon ne sciante, ke ĝi estas vera lingvo. Al Pajala venas el Afriko "nigra pastro", mirpersono por la pajala-anoj.

La pastro ne trovas komunan lingvon kun la eklezianoj, kaj finfine li predikas esperantlingve. Niila interpretas la tutan predikon! Montriĝas, ke Niila ĉe Matti estis aŭskultinta esperantokurson de la radio.

Por ke la teatra aktoro sciu kiel prononci esperanton la teatro kontaktis Allan Mehtonen, kiu vizitis provludon. La premieron li partoprenis kiel invitito, kaj mi havis honoron lin "eskorti".

Dum la paŭzo ni hazarde renkontis la verkiston kaj alparolis lin. Li estis tre afabla, ĝentile interesata ankaŭ pri esperanto. La lingvoj ja lin ĝenerale interesas, ĉar lia edzino venas el Nederlando. Esperanton li neniam lernis, sed ĉiam estis interesita pri ĝi. Li bedaŭris, ke li nek komprenas nek parolas esperanton. Tiujn esperantlingvajn frazojn, kiuj troviĝas en la romano, donis al li lia norvega konatulo, Marianne Lund,

kiu loĝas en Tromsø. – La sola esperantlingva frazo de li estis: "Mi nomiĝas Mikael Niemi." Dankon al vi, Mikael Niemi, ke vi donis al ni tiel amuzan romanon kaj tiel ĝojan kaj interesan teatraĵon!

Auli Vihermä

Tri esperantistoj kontribuos interkulture en Jyväskylä

Unesko-konferenco pri Interkultura Edukado en Jyväskylä 15an-18an de junio 2003 allogas ankaŭ esperantistojn. La temoj de la anglalingva konferenco estas interkultura kompreno, homaj rajtoj kaj la kulturo de paco. Estos entute 500 personoj kiuj faros mallongajn prelegojn pri diversaj kampoj, inter ili almenaŭ tri esperantistoj.

Dafydd ap Fergus, kiu laboras en la Brusela Komunikadcentro, prelegos pri la efiko de la superregado de la angla en la kampo de edukada komerco.

Krome prelegos Radojica Petrovic' kaj Mauro la Torre. La Torre estas prezidanto de ILEI kaj prizorganto de la projekto Interkulturo. Petrovic' estas ILEI-estrarano, kiu anoncis sian Esperanto-klason de Ĉaĉako en Serbujo al la virtuala lernejo Tibor Sekelj. Ili prezentos siajn revojn kaj spertojn pri tiu projekto.

Ni ne scias ĉu la aktivuloj kunlige kun la vizito al Finnlando havos eblecon viziti aliajn lokojn, sed ni certas ke ili almenaŭ volonte renkontos aliajn esperantistojn en Jyväskylä. Se vi volas prezenti al ili inviton aŭ havas ideon pri kunlaboro aŭ aliajn komentojn vi estas bonvena kontakti la prezidanton de EAF. Mi nun estas, almenaŭ por la momento, kunordiganto en Finnlando. Mi ne scias ĉu mi mem povos viziti Jyväskylä dum la konferenca tempo.

Pliajn informojn pri la konferenco vi povas trovi ĉe la retadreso: <www.jyu.fi/ktl/unesco/2003>. La anglalingva temo de la konferenco estas: "Teaching and Learning for Intercultural Understanding, Human Rights and a Culture of Peace"

(amr)

UEA deklaras okaze de la tago de la gepatra lingvo

La 21-a de februaro estas ĉiujara Tago de gepatra lingvo, proklamita de Unesko. Ĉi-jare laŭ la propono de Brusela Kominikada Centro UEA preparis deklaron pri la Tago, kies teksto, tradukita al kelkaj lingvoj estas diverslande transdonata al amaskomunikiloj.

La tekston de la Deklaro en Esperanto vi povas legi ĉi tie: http://uea.org/esperanto_p/dokumentoj/deklaroj/gepatraj_lingvoj.html

Jen la deklaro prenita de la supra retpaĝo:

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21-a de februaro 2003

La Esperanto-movado partoprenas ankaŭ ĉi-jare la festadon de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. La agadoj de Unesko en ĉi tiu kampo estis multaj ek de la apero de la studo “The use of vernacular languages in education” en 1953. La dokumento de Unesko 16/C de 1970 diras, ke “La gepatra lingvo signas por la homa estaĵo la esencan vojon, danke al kiu ŝi eniras sian societon, igas sia la kulturon de la grupo, al kiu ĉi apartenas, kaj metas la bazojn por la evoluo de siaj intelektaj kapabloj”.

Tiajn ideojn esprimis ankaŭ edukistoj kaj filozofoj. Ni citu nur Gandhi, kiu en 1920 tre klare diris: “efektiva eduko estas neeblo per fremda lingvo – nur la popola lingvo povas instigi originalecon de penso en la plej larĝa nombro de homoj.” Aŭ, ankoraŭ pli klare: “Doni al milionoj da homoj la konon [nur] de la angla estas sklavigi ilin”, en la verko Hind Swaraj.

Kelkaj homoj asertas ke la internacia lingvo Esperanto havas la celon forigi ĉiujn aliajn lingvojn kaj iĝi la sola lingvo de la mondo. Tio ne estas la celo de la Esperanto-movado, kiu havas precize la malan celon.

Fakte la morto de lingvoj ofte estas la sekvo de la uzo de lingvoj de nacioj pli fortaj en internaciaj rilatoj.

Esperantistoj ĉiam celis konservi ĉies gepatran lingvon, kaj nur proponi la uzon de Esperanto en la internaciaj rilatoj.

Ni volas, ke ĉiu infano havu la homan rajton esti edukata en sia gepatra lingvo.

Ni volas ke ĉiu homo havu la homan rajton partopreni en la internacia vivo sur bazo de lingva kaj kultura regaleco. Ni volas nur ke la artikolo 2-a de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj, kiu malpermesas diskriminaciojn surbaze de lingvo, estu aplikata je ĉiuj niveloj.

Je internacia nivelo la neŭtrala lingvo Esperanto estas la rimedo por certigi la Lingvajn Homajn Rajtojn de ĉiuj.

En tiu senco la Esperanto-movado festas kune kun Unesko la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo.

Universala Esperanto-Asocio

”Maskerado” hungarlingve

Ekde 2000 sinsekve publikiĝis en Britio, Usono, Turkio, Rusio kaj Germanio diversaj eldonoj de ”Maskerado ĉirkaŭ la morto”, origine Esperantlingva memoraĵo de Tivadar Soros pri la Holokaŭstaj jaroj 1944-45, kies duan E-eldonon (UEA, 2001) redaktis Humphrey Tonkin. La hungara traduko de István Ertl, ”Álarcban”, aperis ĉe la Budapeŝta eldonejo Trezor, estrata de Vilmos Benczik, meze de novembro 2002 – tiel ke ĝiaj 2500 ekzempleroj trafos pintan librosezonon jarfinan.

La hungara versio baziĝas sur ne malpli ol kvar fontotekstoj: krom la du Esperantaj eldonoj de ”Maskerado” (1965, Stafeto; 2001, UEA) ĝi prenis en konsideron ankaŭ fruan manuskriptan angligon fare de Sophie Bogyo, kaj precipe la modernan anglan tradukon (2000) de Tonkin. Enhave ĝi estas pli riĉa ol ajna ĝisnuna eldono, ĉar ĝia notaro kaj bibliografio estis ampleksigitaj ĝis la enpresejigo en oktobro.

Ĝuste en la librofinaj notoj abunde menciigas Esperanto, ekz. la fakto ke George Soros en 1947 forlasis Hungarion danke al la eblo vojaĝi

al la UK en Berno, post kiu li partoprenis en konferenco de TJO (posta TEJO) en Ipswich, proponante projekton de bicikla vojaĝo tra Eŭropo por propagandi Esperanton.

Restas vidi ĉu la ĵusa literatura Nobel-premio al Imre Kertész, verkisto same hungara kaj juda kiel Tivadar Soros (kaj praktike sam-aĝa kiel ties mondfama filo George Soros), kreskigos ĉe la publiko la intereson pri tiu ĉi verko kapabla siamaniere helpi la hungaran legantaron, ĝuste laŭ la ripete esprimata deziro de Kertész, konfrontiĝi kun ankoraŭ profunde traktenda periodo el sia pasinteco.

István Ertl, GK de UEA

Nova fondaĵo ĉe UEA: Edukado

La estraro de UEA ĵus voĉdonis por starigi novan fondaĵon, kies nomo klarigas ties funkcion: EDUKADO.

Ĝi estas fondaĵo por kolekti financan subtenon por la kampo de Edukado/Instruado. Ĝis nun la instruado de Esperanto (unu el la prioritatoj de la nun valida labor-plano) estis subtenata esence de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ILEI, per sia negranda buĝeto kaj per la helpo, kiun UEA donis ĉiujare al ILEI el sia propra buĝeto.

Nun individuaj esperantistoj, kiuj opinias, ke gravas instruado de Esperanto kaj pli ĝenerale edukado pri Esperanto, havas plian eblecon direkti sian helpon al la ĝusta loko.

Kiel pri aliaj fondaĵoj oni povas indiki ke oni deziras, ke la donaco eniru la Kapitalon Edukado. En tiu kazo nur la rento estos uzata por elspezoj, dum la kapitalo restos por doni renton ankaŭ en postaj jaroj.

Nun, kiam ILEI provas lanĉi la duan periodon de la internacia instrua projekto INTERKULTURO, estas evidente, ke helpo (almenaŭ en la formo de lernolibroj por lernantoj en landoj je malforta ekonomia nivelo) estas ege necesa.

Oni povas donaci per la kutima konto de UEA

kun la indiko ”por Fondaĵo Edukado” aŭ ”por Kapitalo Edukado”.

*Renato Corsetti, prezidanto de UEA
Mauro La Torre, prezidanto de ILEI*

Infanaj desegnoj petitaj por granda ekspozicio

En 2004, la Esperanto-Centro de Angers (Francio), festos la centan datrevenon de la kreado de esperanta grupo en la urbo. Je tiu okazo, oni antaŭvidas diversajn manifestaciojn kaj interalie, internacian ekspozicion de infanaj desegnoj, sub oficiala patronado, pri la ĝenerala temo de la “daŭra disvolviĝo” (protektado de la naturo, arbaroj, bestoj, lukto kontraŭ la polucio, lernejoj por ĉiuj infanoj, suna energio, pli sana agrikulturo, agado por havigo de pura akvo, protektado de la sano, k.t.p.). La plej belaj desegnoj estos premiitaj kaj por la lernejoj kolektivaj sende, oni povas antaŭvidi interŝanĝojn de desegnoj kun francaj lernantoj.

Estos tri kategorioj por la partoprenantoj: ĝis 7 jaraĝa; de 7 ĝis 10 jaraĝa; de 10 ĝis 14 jaraĝa.

La desegnoj estas sendotaj al: Esperanto-centro, S-ro Frangeul, 6, rue du Buis, 49000 Angers, Francio. Internet-kuriero: <bertrand-gilet@wanadoo.fr>.

Enketado pri la Delegita Reto

Fine de decembro 2002 al entute 871 rete atingeblaj delegitoj de 75 landoj, kies nomoj estis publikigitaj en Jarlibro 2001, estis dissendita enketilo kun la peto respondi, ĉu iu petis ilin pri la servoj en la periodo inter publikigoj de Jarlibro 2001 kaj 2002 (mezo de somero 2001 kaj septembro 2002).

Malgraŭ jarŝanĝaj festoj la delegitoj aktive reeĥis kaj sume ĝis la 21-a de januaro 2003 al la enketo respondis 455 delegitoj de 65 landoj. Montriĝis, ke jes estis petitaj servoj de 244 (54%) delegitoj, dum 179 (39%) delegitoj neni-

Informbazono

am ricevis petojn por iliaj delegitaj servoj. 32 (7%) delegitoj ne certas, ĉu la ricevitaj petoj rilatas al ilia delegiteco aŭ venis per aliaj kanaloj.

La delegitoj, menciintaj ciferojn, ricevis kaj plenumis 418 informpetojn pri siaj lando aŭ urbo, 653-foje peris informojn pri lokaj E-istoj kaj E-grupoj, 488-foje estis kontaktitaj fakcele, kio sume signifas 1559 servojn.

Krom tio, kutime ekster siaj delegitaj devoj, ili ricevis 256-foje petojn pri gastigado, 495-foje – korespondpetojn, minimume 342-foje alispecajn petojn (de simple neordinaraj ĝis monpetadoj).

Pli detale pri la rezultoj vi povas legi en la retejo [uea.org](http://uea.org/esperanto_p/servoj/dr-enketo2001-2002.html), precize, ĉe: http://uea.org/esperanto_p/servoj/dr-enketo2001-2002.html aŭ iam baldaŭ – en la revuo Esperanto.

*el Gazetaraj Komunikoj
de UEA n-ro 164*

E-studado en Murmansk

En la lingvistika centro LINGUA 14 en Murmansk el la kursanoj de A.Masjukas dek kvar proponis daŭrigi la E-studadon post mallonga kurso laŭ ESPERANTO SIMPLE. Ili ankaŭ starigis junularan E-klubeton en "Lingua" kaj starigis ligojn kun angla mezlernejo, kie estas E-grupo, trovis amikojn laŭ la listo de korespondproponoj de EKS /Esperanto Koresponda Servo/en la reto.

masiukas@mail.ru

Korespondu al Japanio

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al: Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku wasedamati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanio.

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn. Estas rifuzataj monhelpa peto kaj propono je komerco. Aldono de 2 internaciaj respond-kuponoj estas bonvena por faciligi nian laboron.

Aliĝilo Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF
22.-23.3.2003

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo: •

16 • ĝis la 28.2.2003 _____

20 • ekde 28.2.2003 _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Senpage infanoj sub 15 jaroj kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando.

VT-paketo: •

55 • VT-paketo (tranokto, _____
2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

30 • VT-paketo sen tranokto _____
(2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Deziroj koncerne tranokton aŭ manĝojn:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarekatu 15 C 65
FIN-00530 Helsinki

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bonvenon!

Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville 22.-23.3.2003

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu: •

16 • 28.2.2003 saakka _____

20 • 28.2.2003 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt.

VT-paketti: •

55 • VT-paketti (majoitus, 2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) _____

30 • VT-paketti ilman majoitusta (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) _____

Yhteensä maksettava EAF:n tilille _____

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen _____

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarencatu 15 C 65
00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825.

Tervetuloa!

**Vintraj Tagoj
de EAF en Lahti**
la 22an kaj 23an de marto 2003
Sonoj, bildoj kaj sonbildoj
Lahden kansanopisto
Harjukatu 46

Esperanto-Asocio de Finnlando invitas al Lah-
ti, grava urbo por la radio kaj televido en nia
lando, por trakti ĝuste radion kaj televidon. Ni
spertos sonojn, bildojn kaj sonbildojn. Sub gvido
de nia ĉefpreleganto Katja Lampinen ni lernos
interalie kiel prepariĝi por intervjuo. Ni vizitos
la muzeon pri radio kaj televido, spektos filmojn
kaj aŭdos radiajn elsendojn. Vespere ni ĝuos
konkurson pri filmdublado (EAF-teamo provas

**Suomen
esperantoliiton
talvipäivät**

Lahdessa 22.-23.3.2003

Ääniä, kuvia ja äänikuvia
Ljud, bilder och ljudbilder

Suomen Esperantoliitto toivottaa tervetulleeksi
radio- ja TV-kaupunki Lahteen, tutustumaan
esperanton kautta radio- ja televisiomaailmaan.
Kuulemme ääniä, näemme kuvia ja koemme
äänikuvia. Lampisen Katjan opastuksella opet-
telemme valmistautumaan haastatteluihin.
Saamme tietoa esperantoradioista ja katselem-

per voĉa kreivo superi FEJO-teamon), komunan kantadon kaj verŝajne pliajn programetojn ... Viaj kontribueroj ankoraŭ povos trovi lokon en la programon.

Sabate, inter la taga kaj vespera programoj, kelkaj asocioj organizos siajn proprajn kunsidojn. Dimanĉe post la matenpreĝo, kiun organizas la kristana asocio KELF, okazos la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando. Venu al ĝi – opiniu kaj proponu, ankaŭ pliaj kandidat-oj por la estraro bonvenas!

Dum Vintraj Tagoj ni ankaŭ aparte memoros niajn subtenantojn, la anojn de societo Nino Runeberg. Ĉu vi scivolas kiel aliĝi al la rondo de Nino Runeberg? Estas simple. Pagu la sumon, 36 eŭrojn, al la konto de EAF! Pliajn informojn pri la societo vi trovas en aparta ĉi-numera artikolo.

La ejo Lahden kansanopisto (popola instituto de Lahti) estas konata por multaj inter ni pro la UK-preparaj seminarioj tie okazigitaj. La lernejo provizas tre taŭgajn kadrojn por nia renkontiĝo

por tranokto, manĝo kaj bone ekipitaj kunsidoj-oj. Ĉio estos proksima ĉar ĝi situas tre konvene en la centro de la urbo tuj apud la stacidomoj.

Lahden kansanopisto informas, ke ili ne povas garantii tranoktadon menditan nur du semajnojn antaŭ la Vintraj Tagoj. Manĝopaketon oni povas mendi ankoraŭ du tagojn antaŭe. Se vi aliĝos post la 7-an de marto, nepre kontaktu kun Tiina Oittinen aŭ kun Päivi Saarinen por certigi vian tranoktadon.

Nia renkontiĝo komenciĝos per lunĉo je 11.30 sabate kaj finiĝos per adiaŭa kafo je la 15a horo dimanĉe. La kotizo inkluzivas la viziton al la muzeo.

Respondeculoj pri la programo estas Anna Ritamäki (tema programo) kaj Tiina Oittinen (ankaŭ kunsidaj aferoj, salonmendoj k.s.). Respondeculo pri la aliĝoj, kiujn vi sendu al la oficeja adreso, estas Päivi Saarinen.

Bonvenon!

La estraro de EAF

me filmejä. Iltaohjelmassa on mm. elokuvadubbauskilpailu, yhteislaulua ja pieniä ohjelma-numeroita. Sunnuntaina käymme Radiomäellä Lahden Radio- ja TV-museossa, johon tutustumme oppaan johdolla (sisäänpääsymaksu ja opastus sisältyvät ohjelmapakettiin).

Lauantaina on varattu aikaa jäsenyhdistysten kokouksiin päivä- ja iltaohjelman välillä. Sunnuntaiamuna KELFin järjestämän aamuhartauden jälkeen alkaa Suomen Esperantoliiton vuosikokous, johon odotetaan kaikkien aktiivisesti osallistuvan. Tule sanomaan mielipiteesi liiton toiminnasta ja vaikuttamaan siihen samoin kuin henkilövalintoihin.

Ne, jotka erityisesti haluavat tukea Suomen Esperantoliiton toimintaa, voivat liittyä Nino Runeberg -seuraan. Jäsenmaksu on vuosikokoukseen asti 36 euroa ja se maksetaan EAF:n tilille. Seuran jäsenille on erityinen tilaisuus juuri ennen iltaruokailua. Lisätietoja seurasta esperantonkielisessä jutussa tässä lehdessä.

Talvipäivät järjestetään monille tutussa Lahden kansanopistossa, siellähän opiskeltiin ahkerasti kongressijärjestelyjä ennen Tampereen maailmankongressia. Opisto tarjoaa erinomaiset tilat talvipäiville, voimme järjestää niin ohjelman, ruokailun kuin majoituksenkin saman katon alla. Kaiken lisäksi opisto sijaitsee aivan Lahden keskustassa ja sinne on lyhyt matka niin rautatie- kuin linja-autoasemalta. Myös Radio- ja TV-museo sijaitsee opiston lähellä. Ohjelman mukaisesti aloitamme lauantaina lounaalla ja lopetamme iltapäiväkahveilla sunnuntaina.

Lahden kansanopisto ilmoittaa, että he eivät voi taata majoitusta opistolla, jos se tilataan vasta kahta viikkoa ennen talvipäiviä. Ruokapaketti on mahdollista tilata vielä paria päivää ennen. Joten, jos ilmoittaudut 7.3. jälkeen, ota yhteyttä joko Tiina Oittiseen tai Päivi Saarisen ja varmistaudu majoituksesta.

Talvipäiviin liittyvistä asioista voi tiedustella Anna Ritamäeltä (ohjelmajärjestelyt) ja Tiina ▷

Oittiselta (majoitus, ruokailu, kokousjärjestelyt). Ilmoittautumislomakkeet lähetetään liiton toimistoon osoitettuna Päivi Saariselle. Muista myös heti maksaa ilmoittautuminen ja tilaamasi paketti EAF:n tilille.

Tervetuloa!

Suomen Esperantoliiton hallitus

Se nur eblas aliĝu ne pli malfrue ol la 7an de marto! Plej favore aliĝu en februaro!

Se vi ricevis la gazeton post la limdato la 28an de februaro: Vi povas ankoraŭ kelkajn tagojn pagi vian aliĝon laŭ la pli favora kotizo!

La lingvo kaj la vivo en VT

Komence de la Vintraj Tagoj prezentos sin mal-longe esperantisto por kiu la lingvo multe signifas en la vivo. Vilorg Teräväinen ne estas speciala ŝatanto de grandaj E-aranĝoj, sed li partoprenos en VT ĉar la aranĝo ĉi-foje okazas en lia hejmurbo. En Lahti li loĝas de du jaroj.

Vilorg fruinfance restis sen gepatroj. (Pri liaj gepatroj estas eble legi sur la paĝo 523 de la libro "Olimme joukko vieras vaan"). Tamen li konstatas ke la Dio donis al li kapablon ricevi klarecon kaj eblecon akiri konon de la internacia lingvo. Li tute forgesis la gepatran lingvon ĉar li ne havis ŝancon ĝin uzi. Sole la kono de Esperanto kaj akiro de korespondamikoj en Finnlando ebligis kontaktojn kun la finnlanda paren-caro.

Nun li dekomence relernas la gepatran lingvon kaj komprenis, ke Esperanto estas ne sole bona internacia komunikilo, sed samtempe ĝi estas bona komparigilo de lernata lingvo. Aparte li volus dum Vintraj Tagoj trovi esperantistojn, kiuj jam uzas aŭ volus uzi Esperanton lernante aliajn lingvojn, ekzemple la rusan.

Provizora programo – Alustava ohjelma

Sabaton la 22an de marto

Lauantai, 22.3.2003

- 10.30 Malfermo de akceptejoj / Vastaanotto avataan
- 11.30 Lunĉo / Lounas
- 12.30 Bonvenigaj vortoj / Tervetulosanat
- 12.50 Prelego / Luento:
 - Kion kaj kiel eblas rakonti pervoĉe? Mitä ja miten äänellä voi kertoa?
- 13.40 Prelego / Luento: Esperanto-radioj en la mondo / Esperanto-radiot maailmalla
- 14.15 Paŭzo / Tauko
- 14.30 Prelego / Luento: Kiel prepariĝi por intervjuoj? / Miten valmistautua haastatteluun? Laborgrupoj / Työpajoja
- 15.15 Kafo / Kahvi
- 15.45 Rezultoj de laborgrupoj / Työpajojen tulokset
- 16.30 Paŭzo / Tauko
- 17.00 Kunvenoj: FEJO, ELFI, KELF Kokouksia
- 18.15 Akcepto Nino Runeberg / Vastaanotto N.R:n seuran jäsenille
- 18.30 Vespermanĝeto / Iltapala
- 19.30 Vespera programo / Iltaohjelma filmdublada konkurso / elokuvadubbauskilpailu; kunestado / yhdessäoloa

Dimanĉon la 23an de marto

Sunnuntai, 23.3.2003

- 8.00 Matenmanĝo / Aamiainen
- 9.00 Matenpreĝo de KELF / Aamuhartaus, järj. KELF
- 9.30 Kontrolo de rajtigiloj / Valtakirjojen tarkastus
- 10.00 Jarkunveno de EAF / Vuosikokous
- 12.30 Lunĉo / Lounas
- 13.30 Vizito al muzeo / Käynti Lahden Radio ja TV -museossa
- 15.00 Adiaŭa kafo / Kahvi ja loppusanat

Esperanto-kurssi Valamon kansanopistossa 14.-18.7.2003

Esperantokurssit järjestetään Valamon kansanopistossa jo neljättä kertaa. Tänäkin vuonna kurssitasoja on kolme: aloittelijat, jatkajat, keskustelijat. Ryhmät muodostuvat osallistujien mukaan, yritämme houkutella mukaan myös ulkomaalaisia. Opettajina ovat *Atilio Orellana Rojas*, *Carola Antskog* ja *Tiina Oittinen*.

Tule mukaan oppimaan esperantoa Valamon ihmeelliseen ilmapiiriin. Oppituntien lisäksi tutustumme ympäristöön ja vietämme yhteisiä iltoja. Tervetuloa niin uudet kuin vanhat Valamon kävijät!

Viiden päivän kurssin hinta on majoituksesta riippuen 203 eurosta 273 euroon. Hintaan sisältyy majoitus, opetus, aamiainen, lounas, päivä-

kahvi ja iltatee päivittäin sekä viimeisenä iltana juhlaillallinen. Mahdollisuus tulla paikalle jo sunnuntaina 13.7. ilman eri yöpymismaksua.

Ilmoittautuminen tapahtuu suoraan Valamon kansanopistoon, osoite: 79850 Uusi-Valamo, puhelin 017-5701400, faksi 017-5701402, sähköposti: <valamon.kansanopisto@valamo.fi>. Opisto lähettää ilmoittautuneille maksulomakkeen ja lisätietoja. Ulkomaalaisia pyydetään ilmoittautumaan EAF:n kautta. Kurssi järjestetään yhteistyössä Suomen Esperantoliitto ry:n kanssa, yhdyshenkilöinä lisätietoja antavat Tiina Oittinen ja Carola Antskog (osoitteet sivulla 2 tai lehden takasisäsivulla).

VENU AL VALAMO 2003

Belega naturo, bonhumoraj kaj bonkoraj homoj, travivaĵoj pere de Esperanto atendas vin en orienta Finnlando meze de julio. Dum Esperantokursoj en Popola Instituto de Valamo povas lerni la internacian lingvon en ĉiuj niveloj. Spertuloj povas helpi la novulojn. Ĉiutage estos instruado ĉirkaŭ 5 horojn: Tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas la lingvon komencas de la unuaj aferoj. Aliaj profundigos sian lingvoscion kaj vi kiuj jam scipovas la lingvon povos diskuti, aktori, legi artikolojn kaj rezumi ilin, aŭskulti prelegetojn. Je via dispono estos tri instruistoj. Posttagemeze kaj vespere estos aranĝataj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo. Vespere estos komuna programo kun prelegetoj, kunkantado, kunkudado, muzikado, saŭnumado, manĝado. Ĉio tio en trankvila etoso de la monaĥejo: laŭvole eblas al vi viziti ortodoksan diservon en belegaj preĝejoj en la areo.

La kursosemajno: 14.-18.7.2003.

La loko: Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, orienta Finnlando

Instruistoj: Atilio Orellana Rojas el Nederlando/Argentino; Carola Antskog kaj Tiina Oittinen el Finnlando.

Se vi volas vidi kia la loko estas, iru al <www.valamo.fi>. Notu, ke en la Popola Instituto de Valamo la personaro nek parolas esperanton nek respondas al esperantlingvaj retpoŝtoj. Bonvolu kontakti pere de EAF.

Prezroj de la kursosemajno inter 203 – 273 eŭrojn depende de tranoktado.

Petu pliajn informojn de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF). Kontaktulo: Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: 02-2305319, <sekretario@esperanto.fi>.

Pliaj informoj ankaŭ de Carola Antskog, sekciestro de ILEI en Finnlando, adreso: Dragfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, Finnlando, <cantskog@kolumbus.fi>.

BONVENON!

La estraro kunvenis

Okazis seminaria kunsido de EAF-estraro la 9an ĝis la 10a de novembro 2002 en Källkullen, Kimito. Partoprenis prezidanto Anna Ritamäki, sekretario Tiina Oittinen, Anna-Liisa Heikkinen, Jukka Noponen, Päivi Saarinen kaj vicedstrarano Eero Rinta-Karjanmaa kaj kiel FEJO-representantoj Mikko Mäkitalo kaj Timo Pirinen. Diskutoj okazis dum la tuta semajnfino. La oficiala estrarkunsido okazis la dimanĉon 10.35-14.20 (kun paŭzo 12.00-13.15).

Kiel sciigojn la estraro notis ke la antaŭa EAF-prezidanto Jukka Pietiläinen defendis 5.11.2002 sian doktoran disertacion kaj ke Aini Vääräniemi ne plu apartenas al la redakteja grupo. La estraro notis ke la vortara grupo kunsidis la 2.11.2002 en Helsinki. Post la kunsido Osmo Buller iĝis membro de la grupo. EAF donacas la novan PIV-vortararon al ĉiuj grupanoj, kiuj ĝin deziras ricevi. La stokejo de Niittymäentie estis malplenigita 5.11.02. Päivi Saarinen kompilis liston de gazetaj dokumentoj kiuj troviĝis en la stokejo. FEJO-representantoj rakontis pri la aktivaj aĵoj de FEJO. Plej oftaj aranĝoj estas sportaj. En septembro fejo-anoj vizitis Börje Eriksson kaj la bienon Esperarto en Orimattila kaj ili planis vojaĝon al Turkuo fine de novembro. Dum aŭtuno EAF ricevis tri informpetojn de studentoj kaj lernantoj, kiuj prelegos aŭ faras projekto-laboron pri Esperanto. Ekzemple venis demando de 9-klasano el Jokioinen kaj de studento el la universitato de Vaasa, kiu faris seminarilaboron pri la temo ĉu esperanto estas natura lingvo.

Sub la punkto financaj aferoj la estraro decidis fermi la konton 800015-70209776 kaj decidis pri novaj anoncprezoj en Esperantolehti. AT en Taivalkoski donis profiton de 886,60 e. Esperanto-flago estis donacita al taivalkoski-anoj. La estraro decidis pagi 150 e pro la teknika redakto de Esperantolehti al Ilkka Santtila pro uzo de propraj laboriloj dum 2002 kaj pagi la membro-kotizon al EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), 0,25 e/membro. La asekuro en Sampo estas ŝanĝita

tiel ke ĝi nun kovras la plian spacon en la stokejo de Vapaa-ajattelijat kaj ne plu la stokejon en Niittymäentie.

Nova eldono de Forsman-libro pretas. Preskostoj: 759,20 e. Krome EAF pagos al Lars Forsman 25 Skr (ĉ. 2,50 e) por ĉiu ekzemplero. La vendoprezo estas 10 e (20 % rabato de samtempa aĉeto de 10 ekzempleroj).

La estraro pritraktis la ideon lanĉi informadan projekton, kiu estis diskutata en la kunsido 20.7.2002. Post longa kaj profunda diskuto la estraro konstatis, ke la projekto bezonas antaŭ-preparadon kaj decidis fondi projektesploran grupon por fari la necesajn esplorojn kaj super-rigardojn. La celo de la projekto estus levi la



Jen kunsida paŭzo sed daŭre la sekretario Tiina Oittinen kaj la prezidanto Anna Ritamäki provas trovi iom da ordo meze de ĉiuj aferoj deciditaj kaj ankoraŭ decidendaj. En la fono prezentiĝas provo pri financa super-rigardo.

kvalitan nivelon de la asocia informado. La projektesplora grupo konsistos el la prezidanto, la vicprezidanto, la sekretario kaj invitotaj spertuloj. La prezidanto petos al Osmo Buller kaj Jukka Pietiläinen partopreni. Ankaŭ la prezidanto de FEJO estos invitita kiel observanto.

Lige al la informada projekto la estraro diskutis pri la asocia biblioteko, kiu troviĝas en la oficejo. La aranĝo de bibliotekaj aferoj estas ankaŭ unu projekto, kiu urĝe bezonus propran laborgrupon.

Multaj aferoj kiuj restis malfermaj povus esti ligitaj en la planita informado projekto, (ekz. Esperanto tian, E-lehti al finnaj gazetoj, reagoj al gazetaraj artikoloj, interreto).

La estraro pritraktis i.a. dokumentojn kun informoj pri la nun uzata registra sistemo por la asociaj adresoj. Ankaŭ la FEJO-reprezentatoj vigle partoprenis por solvi la problemon, sed ankoraŭ nova prizorganto de la asocia adresaro ne estas trovita.

La estraro decidis pri aliĝkotoj kaj limdatoj kaj temo por Vintraj Tagoj en Lahti. La redakteja grupo de Esperantolehti eventuale kunvenos en Lahti.

La taga programo por venontsomera Valamokurso 14.-18.7.2003 pretas kaj estas sendita al la instituto.

La estraro diskutis pri eblaj temoj de AT en Raŭmo 13.-14.9.2003. Kiel unu sugesto venis la ideo pri maro kaj ligitaj aferoj. Tuomo Grundström kun aliaj raŭmanoj planas la skizon por la tagoj.

Konsiderindaj lokoj por VT 2004 estas Jyväskylä kaj por AT vojaĝo al Lesjöfors, Svedio. Dum 2005 estos datrevenoj por UK en Tampere (10 jaroj) kaj por IJK en Raŭmo (25 jaroj). Venis ideo aranĝi pli grandan someran aranĝon en Finnlando, ekzemple en Raŭmo kun ekskurso al Tampere. La jaro 2006 estas jubilea jaro por Esperanto-klubo de Helsinki (100 jaroj) kaj la jaro 2007 same por EAF.

Pri kuirlibro la prezidanto kontaktis kun Timo Sinnemaa. La plano daŭre estas ke la eldonejo



Timo Pirinen, FEJO-reprezentanto, kaj Eero Rinta-Karjanmaa, vicestrarano de EAF, ĉe la bufeda tablo.

eldonos la esperantlingvan kuirlibron ĝis la UK 2003. Claus Günkel jam kontrollegis la tradukon kaj ĝi plaĉis al li. La prezidanto provas aranĝi artikolon kaj intervjuon en esperantogazetoj (Monato, Kontakto, Esperantolehti ktp) pri la verkisto de la originala libro, Joakim Jormanainen.

Disko de s-ro Gaines, Sinfonio nro 1 Esperanto, nun pretas. Päivi Saarinen informiĝos kiel eblas mendi ĝin al EAF-libroservo.

Jukka Pietiläinen interesiĝas pri la historio de EAF. Lia plano estas fari finnlingvan libron pri Esperanto kaj li tiucele povus utiligi la materialon ordigitan de Erik von Hertzen.

La estraro diskutis la proponon de Anna-Liisa Ali-Simola el Turku, ke membrasocietoj aranĝu ion komunan samtempe en la tuta lando. Tiaj aranĝoj estas ekzemple Agotago-aranĝoj en oktobro. La estraro konstatis ke unu taŭga tago

estas la Eŭropa lingvotago, 26.9., kiu proksimiĝas ankaŭ la AgoTagon komence de oktobro. La ideo ligiĝas ankaŭ al la informada projektpiano de EAF.

Estis diskutita ĉu EAF bezonas pliajn donacobjektojn (edustuslahja). La objektoj povus samtempe esti vendebaj. Oni konstatis ke EAF havas la Setälamedalojn, kiujn oni povus pli bone uzi tiurilate. EAF ankoraŭ havas kelkajn standardojn, kiuj povas esti donacitaj en specialaj okazoj. La ricevantoj de standardoj devus esti listigitaj.

Jukka Noponen demandis, ĉu EAF havus intereson partopreni la remboatan aranĝon Sulkavan Soutu en orienta Finnlando. La estraro sugestis ke indus instigi FEJO-anojn partopreni. (Poste montrigis ke ne troviĝis sufiĉa intereso por partopreno ĉi-jare.)

Grupo nomata Oazo de Esperanto en Usono sendis leteron proponante lokon ĉe la grupo por interŝanĝa studento dum unu lerneja periodo, 10 monatoj. Ili preferas 15-18-aĝan knabon, kiu scipovas kaj la



Anna-Liisa Heikkinen, malnova esperantisto kaj nova kasisto de EAF.



Jukka Noponen, nova kaj aktiva estrarano de EAF.



Päivi Saarinen, vicprezidanto, trovis ankaŭ iom da tempo por ludi kun la fotilo. Tiina Oittinen intertempe okupiĝas pri la gastlibro de Källkullen, la iama lernejo, kie la estraro kunvenis.

anglan kaj la Esperanton. La prezidanto respondis al ili, ke ni verŝajne ne povas trovi tian personon kaj ke ni bezonas pliajn informojn.

(La raporton kompilis la prezidanto surbaze de la protokolo.)

Societo Nino Runeberg

Societo Nino Runeberg (SNR) estas la finna ekvivalento por Societo Zamenhof de UEA, do ĝi estas la societo de subtenantoj de EAF. La societo estis fondita en la 1980-aj jaroj laŭ la iniciato de Osmo Buller. Por aliĝi la societon oni pagas duoblan jaran kotizon de EAF. La societo honorigas per sia nomo al Hjalmar Johannes "Nino" Runeberg (1874-1934), kiu estis la inicianto de EAF (fondita 1907) kaj ties unua prezidanto kaj honora membro. Li estis ankaŭ la unua finna kongresano partopreninte la unuan UK:n en Bulonjo-sur-Marco 1905. Li estis krome ekz. la iniciatinto de la societo Steleto kaj de la klubo Polusstelo.

Societo Nino Runeberg dormis kelkajn jarojn kaj neniu aliĝis al ĝi. Dum la lastaj Vintraj Tagoj de EAF en Mikkeli ĝi estis revivigata. La societo aranĝis antaŭ la vespermanĝo sabatvespere akcepton, kiun partoprenis kelkaj aktivaj membroj de la societo. La revivigado daŭrigas dum Vintraj Tagoj en Lahti, kie same estas aranĝita akcepto je 18.15 antaŭ la vespermanĝo. Se vi ne ankoraŭ estas ano de la societo, sed volas aparte subteni la agadon de EAF, simple pagu la subtenantan sumon, 36 eŭrojn, al la konto de EAF. Membroj de SNR ne nepre devas esti esperantistoj nek membroj de EAF. Tiel kiu ajn, kiu simpatias la agadon de EAF kaj Esperantomovadon, povas fariĝi membro. La estraro dankeme bonvenigas ĉiujn aliĝojn.

La Estraro

Esperanto-societo de Oulu

La jarkunveno okazis la 22-an de februaro 2003. Jen la estraro: prezidanto Erkki Röntynen, vicprezidanto Allan Mehtonen, sekretario Auli Vihermä, kasistino Eila Martin, kaj la aliaj estraranoj Stanislawa Mehtonen kaj Aira Röntynen, vice Raili Marttinen.

Ni kunvenas ĉiun sabaton en la kafejo de la urba biblioteko je la 12-a horo. – Bonvenon!

Biblioteko – Novakiroj

En la oficejo de EAF estas deprunteblaj:

Historio:

Esperanto en Ruslando. Historia skizo. Halina Gorecka kaj A. Korĵenkov. Jekaterinburg 2000. 39 p.

Infanlibroj:

Trans la spegulo. Lewis Carroll. Jekaterinburg. 2001. 128 p.

Noveloj:

Stoatoj de Aŝkelono. La Ruslando. Harry Harrison. 1994. 124 p.

Konsilisto Krespel. E.T.A. Hoffmann. Kalinigrad 2001. 22 p.

Religio:

Religia literaturo en esperanto. Karl-Olof Sandgren. Baden 1994. 136 p.

Romano:

Maigret hezitas. Georges Simenon. Jekaterinburg 1999. 124 p.

La Hobito aŭ tien kaj reen. Tolkien, J.R.R. Jekaterinburg 2000. 223 p.

ELFI

Alvoko al jarkunsido

Jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI okazos sabate la 22an de marto 2003 je la 17h en Lahden kansanopisto, Harjukatu 46, Lahti. Estas traktotaj la laŭstatutaj aferoj kaj la nova statuto.

Estraro

Kokouskutsu

Suomen opettajain esperantoliitto ry:n vuosikokous pidetään lauantaina 23. maaliskuuta 2003 klo 17 Lahden kansanopistolla, Harjukatu 46, Lahti. Käsitellään sääntömääräiset asiat sekä uudet säännöt.

Johtokunta

Esperanto-societo en Turku

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-societo en Turku okazis la 2-an de februaro 2003. La estraro por la jaro 2003 estas jena: Prezidanto: Tiina Oittinen, vicprezidanto: Anna-Liisa Ali-Simola, sekretario: Leena Tiusanen, membroj: Paula Harju, Väinö Havu, Varpu Karo kaj Anja Launiainen, vicmembro kaj kasisto: Veikko Tikkanen. Revizoroj: Ilpo Forström kaj Leila Laineoja kaj vicrevizoroj: Jorma Ahomäki kaj Kerttu Kemppinen.

La societaj agadplanoj por la printempo estos kongreslanda kunveno, muzea vizito kaj printempa ekskurso. Ĉiumerkrede je 16.30 kolektiĝos Diskutrondo en la kafejo de la ĉiovendejo Stockmann kaj ŝanĝas opiniojn kaj spertojn pri la lecionoj de la libro *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker. Krome dum la kafeja renkontiĝo estas informitaj landaj kaj mondaj esperantaj novaĵoj. Vizitantoj estas bonvenaj. Esperantokursoj en Aurala Civitana instituto daŭrigas ĉiun mardon posttagmeze. Ankaŭ la kurson eblas viziti. Kontakto kun la estraranoj por pliaj informoj.

EST-estraro




*Diskutrondo de EST komenciĝis en januaro 2003. La rondo diskutas ĉiun merkredon i.a. pri la libro de Boris Kolker: *Vojaĝo al Esperanto-lando*. En la bildo de dekstre Varpu Karo, Leena Tiusanen, Tiina Oittinen, Jorma Ahomäki kaj Väinö Havu, inicianto de la rondo. Mankas en la bildo kelkaj aktivuloj. La prezidanto de EAF Anna Ritamäki tiun merkredon vizitis la rondon. (Foto: Mikko Mäkitalo, raportis: Tiina Oittinen)*



La julfeston de Esperanto-Societo en Turku la 22an de decembro vigligis Mikko Mäkitalo per gitaro kaj Tiina Oittinen per violono.

Pratempaj amuzoj

KRUCVORT-ENIGMO ALIGILO ALIFLANKE



FEJO Bulteno
3/1988



Unu semajnon antaŭ la 100-jariĝo de Esperanto komenciĝos la 43-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La evento, kiu okazos en Krakovo (Kraków - prononcu: Krakuv) estos sendube unika ebleco renkontiĝi kun esperantakaj pola kulturoj.

43-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

17 - 24 JULIO 1987

FEJO Bulteno
1/1987

KRAKÓW, POLLANDO

FEJO-bulteno



FEJO Bulteno 4/1987

La rekonatulo



Saluton, mi estas la favorato de FEJO. Mia nomo estas Fejino...

Jen mi mallevas min per ĉi-tiu paraŝuto sur la paĝoj de la nova informilo pri FEJO kaj pri Esperanto.

FEJO Bulteno 1/1986

Tiu informilo estas ankaŭ enkonduko por la nova leterkurso de Esperanto. La kurso enhavas ses partojn, entute de sep partojn (kun la informil-enkonduko). Mi ĉeestas la leterkurson (kaj eble Kvinpintoj). La kurso kostas ĉirkaŭ 30 ĝis 50 markojn (la prezo ankoraŭ ne estas konfirmita). Jes, la kurso estas bonega donaco al viaj geamikoj. Pli da informoj pri la kurso venontaŭtune. ĜIS REVIDO!

Kutsu – Alvoko

Suomen Nuorten Esperantoliiton sääntömääräinen vuosikokous pidetään lauantaina 22.3.2003 kello 17 Lahden kansanopistossa, Harjukatu 46, Lahti.

La laŭstatuta jarkunveno de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo okazos sabaton la 22-an de marto je la 17-a horo en Lahden kansanopisto, Harjukatu 46, Lahti.

Tervetuloa – Bonvenon!

Hallitus – La estraro

Sur la nokta ĉielo

Ĉasisto kun hundoj regas la vintran ĉielon

En la vintraj noktoj sude videblas konstelacio kun multaj tre brilaj steloj, Orion. Tio estas ne-tradukebla nomo, sed la konstelacio tradicie reprezentas homfiguron de ĉasisto. Ĉe la mezo estas linio de tri steloj kiel zono sur la talio de la ĉasisto. Pli supre oni vidas du stelojn kiel ŝultroj kaj malpli supre aliajn du kiel piedoj aŭ genuoj. Kelkaj malpli brilaj steloj plenigas la figuron kaj povas esti pensataj kiel kapo, glavo pendanta de la zono kaj ĉasiloj en la manoj de la ĉasisto.

Por astronomio-hobiulo apero de Orion signifas vintron. Aŭtune ĝi komence tute ne levigās dum la malluma tempo, pli malfrue aŭtune ĝi videblas nur post meznokto, sed kiam oni povas vidi Orion antaŭ meznokto, tiam oni scias, ke vintro devas esti proksime. Simile, kiam printempo alvenas, Orion vespere pli kaj pli frue subiras trans la horizonto, ĝis tio, ke ĝi en marto komencas jam dum la vespera krepusko esti preskaŭ ĉe la horizonto. La vintran karakteron de Orion emfazas la fakto, ke ĝi en la vintra solstico (*talvipäivänseisäus*, okazas la 21-an aŭ la 22-an de decembro) meznokte vidiĝas preskaŭ precize sude, kaj do en sia plej alta situo en la ĉielo.


La konstelacion Orion akompanas Canis Major (*Iso koirra*) kaj Canis Minor (*Pieni koirra*), kiujn tradicio rigardas esti la hundoj de la ĉasisto. Speciale rimarkinda estas la plej brila stelo de Canis Major, nome Sirius, kiu estas la plej brila stelo de la tuta ĉielo. Aliaj steloj de Canis Major teorie formas bonan figuron de hundo, kun Sirius en loko de sia koro kaj sia kapo direkte de Orion, sed la supera brileco de Sirius kvazaŭ kaŝas la reston de la konstelacio.

Estante aro de tre brilaj steloj la triopo de Orion kun siaj hundoj regas la vintran ĉielon kaj certe logas atenton de rigardanto. Neĝkovrita

pejzaĝo en klaraj frostaj noktoj ofte ŝajnas emfazi la brilecon de ĉi tiuj steloj. Atingante altecon, kie ĝi en la pejzaĝo estas ofte nur iom super arboj kaj aliaj objektoj, Orion ŝajnas kvazaŭ stari super sia regno, rigardante kaj kontrolante ĉion, kun la granda hundo apude fidele sekvanta sian mastron kaj la malgranda hundo iom pli malantaŭe.

Malproksima ĉasisto kaj proksimaj hundoj

Ĉu granda brileco de stelo signifas tion, ke ĝi elradias tre grandan kvanton de lumo (estas granda stelo), aŭ tion, ke la stelo situas proksime de ni? La respondo estas ambaŭ. Steloj situas en diversaj hazardaj distancoj de ni, kaj ankaŭ la brilkvantoj de la steloj multe diversas. Estas interesa koincido, ke ĉiuj brilaj steloj de Orion estas tre grandaj steloj longe for de ni, sed male Sirius en Canis Major kaj Procyon, la plej brila stelo de Canis Minor, estas malgrandaj steloj tre proksime de ni.



Sirius estas la plej proksima stelo, kiun oni en Finnlando povas facile vidi. En la suda hemisfero estas unu pli proksima, kiun oni ne povas vidi el nia norda lando. Krom tiu ekzistas nur kelkaj etaj, malfacile videblaj pli proksimaj steloj. La distanco de Sirius estas 9 lumjaroj. Procyon estas nur ete malpli proksima, 11 lumjaroj.

Per koincido Betelgeuze, la stelo de la maldekstra "ŝultro" de Orion, aperas esti preskaŭ egale brila kun Procyon. Ĝi tamen estas en distanco de 520 lumjaroj, do 50-oble la distanco de Procyon. Bellatrix en la dekstra "ŝultro" estas ete pli proksima ol Betelgeuze, sed la resto de la brilaj steloj de Orion estas ĉiuj eĉ pli malproksimaj. La plej malproksima estas la maldekstra "genuo", nome Saiph. Tiu vere giganta stelo 2100 lumjaroj disde ni estas unu de la plej distancaj facile videblaj steloj en la tuta ĉielo.

Sed kion vere signifas la "malgranda" distanco de 9 lumjaroj, distanco, kion transiri la lumo bezonas 9 jarojn? Ĝi estas 10 000 oble la distanco de la plej malproksima planedo disde la Suno, do kompare kun la skalo inter la Sunsistemo la najbaraj steloj estas tre malproksime. Ĝi estas pli ol milionoble la distanco de la Tero disde la Suno. Ĝi estas pli ol miliardoble la ĉirkaŭa mezuro de la Tero. Memorante, ke ĉi tie temas nur pri la plej proksimaj steloj, oni komprenas, kial oni tute juste parolas pri "astronomiaj" ciferoj en la senco de tre grandaj ciferoj.

Mikko Mäkitalo



Abonoj por la jaro 2003

Heroldo 30 eŭroj

Literatura Foiro 28 eŭroj

Pagoj al Sampo-banko
konto 800017-70845965

Literatura Foiro – koop
PL 87
00531 HELSINKI

Kuirej|vort|ar|a babil|aj|o II

Keittiö|sana|sto|pakina II

Se vi vizitos la hejmon de la juna paro, eble vi ŝatus kunporti ion kaj donaci al ili. Jen proponoj:

fornganto kaj izoltuko – uunikinnas ja patalappu

potsubaĵoj – pannunalusia

elladigilo, botelmalfermilo, korktirilo –

purkinavaaja, korkinavaaja, korkkiruuvi

senŝeligilo – kuorimaveitsi

fromaĝorobotilo – juustohöylä (*kvankam*

Henriko ne scias, kiel uzi ĝin)

raspilo – raastin

ovopartigilo = *tranĉa liro* – munaleikkuri

pistujo + pistilo – huhmar + survin

kuketŝtanciloj – piparkakkumuotteja

kukmuldilo – kakkuvuoka

fornrezista/fajroimuna plado – uunin/tulen-

kestävä vuoka

tekruĉo – teekannu

akvoboligilo aŭ bolkruĉo – vedenkeitin tai

vesipannu

panrostilo – leivänpaahdin

elektra ŝaŭmigilo – sähkövispilä

elektra miksilo = *likvigilo* – tehosekoitin

gradigita kruĉo – mittakannu; *pesilo* – vaaka

haktabuleto – leikkuulauta

cepohakilo – sipulisilppuri

ajlodispremilo – valkosipulipuserin

pipromuelilo – pippurimylly

salujo, sukeroj – suola-, sokeriastia

fritilo = *pato* – paistinpannu

marmito – pata

ŝtalaj kaseroloj kaj kuirpotoj – teräskattiloita

peniko – (pulla)suti; *rultranĉilo* – taikinapyörä

rulpremilo = *knedplatigilo* – kaulin

tasetoj por mokao; tasegoj = *trinkpotetoj por*

laktokafō kaj teo

teleroj, glasoj, ĉampanglasoj

ĉerpilo – (soppa)kauha; *kulerego* = *kuirkulero*

– (muu) kauha

Kaj ne forgesu kuirlibrojn!

Saliko


Esperantisto en la parlamenton?

Vi decidis!! Miaj tri plej gravaj vortoj:
egaleco, kolektiveco, libereco.

Antero Harju, Järvenpää
a.harju@kolumbus.fi

VASEMMISTO LIITTO
VÄNSTERFÖRBUNDET

246
Uusimaa



Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallioaankatu 10, 15150 Lahti.
☎ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelo, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelo.
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla
☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstie 37, 37500 Lempäälä, ☎ laliu@sci.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2002 on 18 • sisältäen Esperantolehden. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu:

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Drags-

fjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185

- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.
☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusana "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2003**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
2	1.3	15.3	1.4
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 •	1/1 sivu/paĝo 50 •
1/2 sivua/paĝo 60 •	1/2 sivua/paĝo 30 •
1/4 sivua/paĝo 40 •	1/4 sivua/paĝo 20 •

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Esperanto-oficejo

La oficejo de EAF ĉe la strato Siltasaarencatu en Helsinko situas ne fore de la urbocentro, proksime al la metrostacio Hakaniemi. En la oficejo troviĝas sufiĉe granda stoko de Esperanto-libroj kaj gazetoj. Estas ideone trarigardi la bretaron. Sub la bonvolaj portretoj de sinjoroj Zamenhof, Setälä kaj Linja oni sentas sin kvazaŭ inter protektaj genioj kaj gardaj anĝeloj. La oficejon oni povas viziti marde dum la deĵoraj horoj, de la 17a ĝis la 19a. La librojn oni rajtas pruntepreni, ankaŭ per poŝto.

Saliko

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuun alussa. Jutut 15.3.2003 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2003 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.